



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Januaro 2008.

JANUARO	3
DE SAJÓSZENTPÉTER – AL LA EŬROP-FAMO	3
Aŭtobiografio	4
EN METIEJO KAJ MUZEO DE LA EŬROP-FAMA SUKERAĴISTO	6
LA KOPCSIK MARCIPANIO	12
Nikolaj Hohlov (1890-1953)	13
Vintra fabelo	13
Renato Corsetti	14
Ĉi tiu Esperanto estus turka, se oni legus la	14
intencojn de Zamenhof!	14
FUNEBRO	18
Forpasis Ada Csiszár	18
FABELO	20
UNUA NEĜO	20
Kiel mi perdis 5 jarojn el mia esperantista vivo?	20
Aleksandro Petófi	22
Granda estas mond’ sen fino...	22
Saĝaj diroj	23
JARDATREVENOJ	23
LA UNUA BULTENO	24
pri la tutmonda kongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilnius, Litovio	24
26 – 30. 05. 2008	24
A L I Ĝ I L O	25
Osmo Buller	27
UEA – nia monda organizaĵo	27

JANUARO

Januaro, Februaro... kaj baldaŭ alvenas la somero – laŭ la ŝerceca hungara diraĵo.

En novembro ni akompanis vin en la Grotbanejon de Miskolc-Tapolca, kie tutegalas kiu sezono estas ekstere, ĉar ene regas eterna printempo!

Nun, ni faros viziton en Eger, en alia urbo de nia regiono Nordhungario. Ĉi urbo ofertas multe da valoroj, interesaĵoj por rigardi al la tien vizitantoj. Pri la urbhistorio, vi povos legi esperantlingve www.hungario.hu Alklaku Miskolc (regiono 6) kaj trovu Eger.

Nun, ni akompanos vin - karan leganton - al la Marcipan-muzeo ke vi povu trovi grandan plezuron je via emo. Ankaŭ ĉi tie haltas la tempo. Nenion signifas, kiu sezono estas dum nia vizito!

DE SAJÓSZENTPÉTER – AL LA EŬROP-FAMO



La barokaj bildoj pri la geedzoj Kopcsik

Karaj niaj legantoj!

Ekde apero de la homo - sur nia planedo – al niaj ĉiutagoj, ĉiam gravis por ni homoj, kion kiel ni manĝu. Unue grava estis la ektrono de la vivnecesaj kreskaĵoj, la akvo, viando, poste la fajro. Sed trovante pli belan frukton, ni certe elektis, konsumis tiun pli volonte. Pro la kvalita ŝanĝiĝo de de la vivcirkonstancoj, klimat-rilatoj, iloj kaj krudmaterialoj, evoluis ankaŭ la manĝkutimoj, - krom la manieroj prepara, surtabliga, dekoracia kaj konservaj. El la multaj unu sur la alian ariĝantaj konoj elformiĝis-diversfakaj metioj kaj-al ili aliĝantaj artoj. Ĉiam tie kaj tiam naskiĝas elstaraj rezultoj, kie kaj kiam al la faka scio aliĝas la kreanta fantazio de la daŭre aganta homo.

Tiu faktereno estas ekzemple la metio: kuiristo-sukeraĵisto.

Dum niaj temojn havigaj serĉoj, foje ni aŭdis pri la sinjoro majstro-sukeraĵisto Lajos Kopcsik, kiu naskiĝis en la niaregiona setlejo Sajószentpéter, laboris en urbo Kazincbarcika kaj nun vivas, kreas en urbo Eger kiel tiurba honorcivitano.



La korto-interno de la Kopcsik-marcipanio kaj Muzeo

Kiam ni vizitis lin en Eger, li akceptis nin unue en sia metiejo, poste trakompanis nin en sian kvin-ĉambran Marcipanmuzeon estanta en tuja proksimeco de la Minareto. En la Marcipanmuzeo troveblas liaj kreaĵoj kiujn ni povis tutrigardi. Antaŭ ol ni raportus pri la spertitaj kaj rigarditaj vidindaĵoj ambaŭlokaj, bonvolu konatiĝi kun la tre simpatia sinjoro Ludoviko Kopĉik, laŭ la aŭtobiografio verkita de li kaj donacita al ni.

László Pásztor

Aŭtobiografio

Mi naskiĝis en 1941. Finante mian bazlernejajn studojn, mi iĝis sukeraĵistlernanto kaj mi anoncis min al la Borŝod-departamenta Gastigantindustria Entrepreno. Miajn studojn mi finis en 1959 kun honorigo, tiam mi ricevis la titolon „Eminenta Lernanto de la Interna Komerco”. Mi iĝis de 1962 vicuzinmastro, poste de 1964 en urbo Kazincbarcika ĉe sukeraĵistuzino de Borŝoda Gastigantindustria Entrepreno iĝis uzinmastro. En 1963 mi faris sukcesan majstroekzamenon. En 1977 mi fak-abiturientiĝis. De 1960 mi partoprenis ĉiujn signifajn departamentajn kaj landajn konkursojn, en kiuj la ĵurio premiis miajn verkojn ĉiokaze per la unua premio. En la jaro 1970 je la estimo de la 14-a Mondkongreso de la Mondasocio de Sukeraĵistasocioj en Budapeŝto estis aranĝita Landa Kuirist- kaj Sukeraĵistarta Ekspozicio, kie mi akiris la unuan premion kaj ricevis la Arĝentan Pokalon de la Mondasocio.

- En 1970 mi ricevis honorigon Majstro Sukeraĵista. En 1974 mi akiris ormedalon dum la WIKA – Viena Sukeraĵista-Kuirista – Konkurso. En 1977 dum la „Salon Culinaire Mondial” mondekspozicio en Bazelo mi gajnis ormedalon, la fotoj faritaj pri mia verko estis metitaj en la svisan fakan „Orlibron”. En 1977 kaj 1982 oni premiis mian verkon en Prago dum la Gastro Prag Internacia Faka Konkurso per ormedalo.

En 1986 mi ricevis ormedalon en Luksemburgo dum la Expo 86 Mondĉampionado en individua kaj grupa konkurso, mi iĝis mondĉampiono en la sukeraĵistfako. En 1987 mi transpreneblis la „Servado por la Hungara Gastronomio” honorigon. En 1988 en Frankfurto dum la Kuiristolimpio kiel ano de hungara nacia teamo mi ricevis ormedalon kaj Oscar-

premion. La en 1989 fonditan Jozefo Veneŝ-premion – kiun fondis la Asocio de la Hungaraj Sukeraĵistoj kaj Kuiristoj kaj estas la plej signifa faka honorigo – kiel unua mi transpreneblis. En 1988 pro familiaj kaŭzoj mi transloĝiĝis en urbon Eger. Ĉi tie mi administris sukeraĵistuzinon de la Panorama Hotelo kaj Gastigantindustria Entrepreno, poste iĝis uzinmastro de Marcipan-sukerejo, poste Kopcsik/Kopçik/- sukerejo. Dum mia kariero mi subtenis kaj helpis fakinstruadon kaj edukadon de pli kaj pli novaj sukeraĵistgeneracioj. En 1996 dum la berlina olimpio partoprenis miaj dek verkoj kaj mi gajnis dek ormedalojn. Tiu ĉi estis unika dum historio de la sukeraĵist-olimpioj. En 1997 en Karlsruhe oni premiis kun kvar ormedaloj miajn verkojn. En 1977 departemento Heves prezentiĝis en Nederlando kaj okaze de la aranĝaĵo oni aranĝis fakan ekspozicion kaj prezentadon eel miaj verkoj. La 20-an de Aŭgusto mi transprenis Etkrucon de la Hungara Respublika Ordeno. Mi estis kunaŭtoro de la en 1977 eldonita libro titola „Oscar-premiitoj”. Mi ricevis la 20-an de Aŭgusto 1998 la „Por Heveŝ-departemento” honorigan premion. Dum la 1998-jara Luksemburga Gastronomia Mondĉampionado mi ricevis 6 orajn, 3 arĝentajn kaj 3 bronzajn medalojn. En novembro de 1998 mi ricevis honordiplomon de urbestro de urbo Eger, poste la 20-an de Aŭgusto 1999 la titolon „Honorcivitano de Eger”.

Krome:

2006: Heveŝ-departementa Prima-premio.

2006: Stelo de Eger Plaketo

2006: Stelo de Kazincbarcika – Marmortabulo.

2007: Arĝenta Kruco de la Ordeno „Hungara Respubliko”.

En jaro 2000 la Hungara Televido faris portretfilmon pri mi, en serio „Jarmilaj Fabeloj”. En 2001 mi iĝis metite en libron de Guinness –rekordoj kun mia el sukero farita 3,5 kvadratmetra murbildo kaj kun la dum berlina olimpio gajnitaj dek ormedaloj. En 2002 pli nova portretfilmo pretiĝis pri mi kaj transpreneblis la „Pro Turismo” premio. En 2004 mia memstara ekspozicio estis en Stockholmo, dum kio mi laboris ankaŭ antaŭ publiko. La 7-an de Julio 2005 malfermiĝis la Kopcsik-Marcipanio en urbo Eger kaj la germana kuiristsocieto honorigis min per ora verkarpremio.

Miaj verkoj estas troveblaj: en Aŭstrio, en Germanio, en Usono, en Nederlando, en Kroatio, en Svedio, en Rusio /inter aliaj en kolektaĵo de patriarko AleksijII kaj ankaŭ en la ortodoksa eklezia kolektaĵo/, kaj en Eger en Ornamĉambro de la Urbodomo /blazonoj de Hungario kaj Eger/, en la Offi-domo /Guinness-rekordo - sukerbildo / kaj – nature – en la Kopcsik-Marcipanio/ ĉ.120 ornamverkoj/.

Kopcsik, Lajos
majstrosukeraĵisto
Honorcivitano de Urbo Eger

(La aŭtobiografion de sinjoro Lajos Kopcsik, esperantigis László Pásztor)

EN METIEJO KAJ MUZEO DE LA EŬROP-FAMA SUKERAĴISTO

Sinjoro Lajoŝ Kopcsik (Ludoviko Kopçik) la sukeraĵistmajstro en sia metiejo akceptis la geedzojn Pásztor. Li prezentis nin al sia helpanto, al la ankaŭ tiam tie kunlaboranta grafikartisto István Herczeg. Ili antaŭplanas kune la artkreaĵojn, sed s-ro Herczeg faras la diversajn kalkulojn kaj desegnojn al la dimensioproporciaj figuroj, krome faras la muldilojn, ktp.



S-ro István Herczeg, la helpanto de s-ro Kopcsik.

Antaŭ la rigardo de la metiejo ni finrigardis la diversajn honordiplomojn, medalojn kaj distingojn de sinjoro Kopcsik. Sinjoro Lajos Kopcsik rakontis, ke li estis malsanema infano, “lin sia patrino direktis al la kariero sukeraĵisto, ke de la multaj dolĉaĵoj li dikiĝu. Kiam li survestis unue la blankan mantelon, li jam sciis, ke li sian tutan vivon oferos al la sukeraĵarto.”

Ekde lia pensiuliĝo li okupiĝas per la sukeraĵskulptoarto per financa subteno de la Urba Konsilio de Eger. El polvosukero per ceteraj almiksaĵoj li faras siajn admirindajn kreaĵojn.

En 2008 li deziras prezenti sian ĝis nuno la plej belan kaj kompletan kreaĵon la barokan ĉambbron, el kies meblaro jam pretiĝis pli da pecoj, objektoj.



En la metiejo

Ni vidis ekzemple la admirindan spegulon, la blanka-glazuran sed ore ornamitan kahelfornon, la portretojn de geedzoj Kopcsik en belornama baroka kadro, unu belan verdmarmoran tablopaĝon imitantan tableton kaj multajn aliajn etajn trezoraĵojn kaj ĉiun el sukero! Sinjoro Kopcsik pridiris ankaŭ tion, ke en la baroka ĉambro kia estos la lustro kaj la fenestron kovros faldumita kurteno, ankaŭ la plafono kaj la planko prepariĝos el sukero.



Pecoj de la barokĉambraj ornamaĵoj


Kelkajn kvadratojn de la intarzion imitanta planko ni jam povis rigardi. La kreaĵojn oni pentras kaj lakas. Sed, kompreneble, se la ĉambro pretiĝos, tien enpaŝi ne estos permesita, nur de ekstero estos admireblaj ĉiuj trezoroj de la baroka ĉambro. Post rigardo de la metiejo, naskiĝejo de la admirindaĵoj, sinjoro Kopcsik mem trakompanis nin en la Muzeon kaj Marcipansukerbutikon.

Li, la majstrosukeraĵisto estas honorcivitano de sia urbo Eger.



Blazono de urbo Eger

La Kopcsik Lajos nomon portanta senpara niapatruja muzeo, la Kopcsik-Marcipanio estas la krono sur lia bela kariero.



Vinbotelo de Eger

La Muzeo konsistas el kvin ĉambroj. En la lasta malgranda estos lokigata la baroka ĉambro. En kvar ni povas rigardi la plej grandiozajn kreaĵojn de la 20 laborjaroj (el la pli ol 500 pecoj) la ekspozicion el ĉ, 120 pecoj.

“La majstro kiu en siaj fingroj havas sian animon” – kiel konstatis unu verdiron skribinta honordiplomo – brilokule montradis al ni siajn distingojn, la el sukero faritajn imitaĵojn de siaj honordiplomoj, kaj en la vitroŝranketoj ekspoziciitajn siajn 120 kreaĵojn. Al li niaj mirplenaj okuloj, vizaĝoj, ridetoj pruvas, ke siaj kreaĵoj denove kaj redenove gajnas sukcesegon.



Torto pro enpaŝo en la Eŭropan Union

Ekde somero de jaro 2005 brilas en Eger /centro de departemento Heves/ ĉi tiu juvelo en iu rekonstruita kara malnova domo, en najbareco de la Minareto.


En la multkoloraj kaj multformaj verkoj estas nur unu komuna eco: ĉiuj pretiĝis el sukero. La ĉefverkoj estas bonaj apologoj de kapabloj de la sukeraĵisto, kiu krom la sukeraĵoj pretigas eĉ aliojn elkore, ame kaj persiste!



La malgranda Vuk (vulpido) –fabelfiguro de hungara fabelo de István Fekete

La rigardantulo apenaŭ povas reteni sin de tuŝoj de la ekspoziciitaj objektoj, ĉar ne volas kredi, kion vidas. Oni malfacile povas akcepti, ke ekz. la granda barelo ne estas skulptite el ligno, kaj ankaŭ la artan sonorilego ne estas el bronzo, tial ĝi ne povas elsoniĝi. Aŭ la plumbovitroj estas nur imitaĵoj, la produktaĵoj ŝajnas kiel ceramikaĵoj, oraĵistaĵoj, oleopentraĵoj kaj, ceteraj kiuj ĉi tie viciĝas.

Estas tie grandega vinbotelo, poŝtkarto, grandega libro kun kovrilo, preskaŭ eksonanta gramafondisko kun ties kovrilo, iama gramofono, ĉiuspecaj ludiloj, admirinda armilo kaj ceteroj.



Ornamaj teleroj

“Post fino de la baroka ĉambro, mi okupiĝos pri papilioj” – respondis al mi je mia demando, koncerne siajn estontajn planojn.

Ĉe antaŭo de sia grupeto - trio - la majstro sesdekkvinjaraĝe plu laboras. Tuttagojn, ankaŭ dum festoj laboras li, se siaj “sonĝoj estas pli senpaciencaj”.

Menciadante sian laboron Ludoviko Kopesik konfesas sincere, ke li ĉiam ŝatis ĝin, sed ĉefe nun feliĉigas lin. Post "fino" de sia aktiva servo povis realigi siajn sonĝojn, dezirojn, ĉefe kiel emerito li povis evoluigi sian talenton. En ĉi jaroj li akiris - dum fakolimpio antaŭ ĉiuj kunuloj samtempe - ankaŭ dek ormedalojn, en Moskvo en iu hungara sukeraĵejo li plenigis longan vitrinvicon per pli ol cent marcipano-verkoj. Li ornamis en Eger per siaj daŭremaj verkoj la ornamĉambro de la urbodomo kaj en la hoteleto li metis tiun verkon, kiu portis por li Guinness-rekordon. Liaj multaj verkoj troviĝas multloke, lia iu verko estiĝis alte taksita de patriarko tutrusoj.

Jen lia letero al sinjoro Kopcsik:

S-ro Lajos Kopcsik
Majstro-sukeraĵisto
Eger
Hungario

Estimata Sr-o Kopcsik!

D-ro György Nanovfszky, ruslanda ambasadoro de la Hungara Respubliko transdonis al mi de Vi, el sukero preparitan ikonon. Tiu estas iu admirinda arta kreaĵo, al tiu similan mi ne vidis ankoraŭ. Dio donacis al Vi abunde artan talenton, tion Vi utiligas en la majstrosukeraĵista fako.

La de Vi preparita ikono ricevas meritplenan lokon en rezidejo de la Patriarko kaj multe da homoj povos admiru tion.

De tempo al tempo ni aranĝos ekspoziciojn pri la modernaj ekleziaj artoj, tiuj renaskiĝis baze de 70-jara batalanta ateismo en Rusio.


Ni tiel pensas, ke dum tiuj ekspozicioj la de Vi preparita ikono havos indan lokon.

Mi deziras al Vi el mia animo, ke via talento progresu plu kaj ĝojigu la homojn.

Dio benu Vin kaj donu al Vi sanon kaj longan vivon.

Moskvo, la 16-an de Marto de 1998.
Aleksij II-a

Patriarko de Moskvo kaj Tutrusoj



Jen la sukerimitaĵo de letero de la Patriarko

La majstrosukeraĵisto de Eger ankoraŭ atendas ĝojon, feliĉon de la emerita aĝo. Kaj li sentas tiel, ke ricevos tiujn.

LA KOPCSIK MARCIPANIO

La tielmaniere prinomita vendejo de marcipanoj, antaŭ du jarojn malfermis pordon kune kun la Kopcsik-Muzeo. Ĉi tie funkcias la deponejo kaj vendejo de la Szamos noma marcipanuzino de Pilisvörösvár. Al la marcipanpreparo instruis sinjoro Mátyás Szamos (Matiaso Samoŝ) - la posedanto de la marcipanfabriko – sinjoron Kopcsik. La rezulto de la bonkonateco kaj amikeco estas, ke la du entreprenoj funkcias samloke.

Verkis kaj esperantigis
László Pásztor



Kopcsik-Marcipanio



Nikolaj Hohlov (1890-1953)

Lia liriko estas tre multflanka, jen li kantas tre individuece, trovante sian inspiron en diversaj animstatoj kaj travivaĵoj, jen li ŝajnas poeto-profeto kun forta sociala sento kaj brula zorgo pri la sorto de la homaro.

(Gvidlibro por Supera Ekzameno – Historio, literaturo)

Jen, unu poemo de li!

Nikolao Hohlov:

Vintra fabelo

Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo,
Kun tintila serenad’
Ni veturas, aventuras, la ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad’.

En sereno de l’ ebena malaperas la fadeno
De la glata vintra voj’...
Mia Nita – am’ subita, de la frost’ ebrigiĝita
Alpremiĝas en la ĝoj’.

En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo
De la sentoj en la kor’,
Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide
Kun favoro de Amor’!

Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj
Por dancanta ciganin’,
Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝutiranu
Per freneza takto nin!

Brila neĝo – vintra reĝo – ĉion tenas en sieĝo,
Gaje ĉirpas en la knar’,
La survoja vento ĝoja en malklara gam’ hoboja
Vokas, logas la kampar’.

Unu suno – unu junu... la unua febra kuno
Kaj magia stelpoem'...
Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita
Ĉion kronas per alp'em'!

Renato Corsetti

Profesoro pri Psikopedagogio
de lingvo kaj komunikado,
Universitadi Roma "La
Sapienza", Facoltà di
Psicologia 1.

Naskiĝis en 1941-a. Post unua
doktoriĝo en 1964-aprilo
Ekonomio en la Universitato
de Romo, "La Sapienza", kaj
post kromaj studoj en la
Universitato de Torino pri
organizado, ekde la jaro
1974-a okupiĝis pri studoj pri lingvoj kaj aparte pri
soci-lingvistiko. Poste, ekde la jaro 1980-a, okupiĝas
pri esploroj pri infana dulingveco kunlabore kun
profesorino T. Taeschner de la Fakultato pri Psikologio
de la universitato "la Sapienza" en Romo.

En la movado li estis aktiva en pluraj lokaj, landaj kaj
internaciaj organizaĵoj. Honora prezidanto de TEJO,
eksprezidanto de UEA, nuna prezidanto de Itala
Esperanto-Federacio.



Ĉi tiu Esperanto estus turka, se oni legus la intencojn de Zamenhof!

Esperanton kreis viro, kies menso altgrade funkciis virine, per intuicio.
Bonŝance li ne estis lingvisto, sed simple lingvo-amanto. Bedaŭrinde postaj generacioj de
viroj, kies menso funkcias nur vire provis kompreni ĝin, uzi ĝin kaj perfortis ĝin. Aliflanke
Zamenhof estis filo de sia tempo kaj el tio venas la problemoj pri seksismo en Esperanto, kiuj
estus tute solveblaj, se oni ne obstinus virece tranĉi ilin per forto kaj gajni kontraŭ la aliaj.

Esperanto naskiĝis en Eŭropo, sed Zamenhof ne volis ĝin lingve hind-eŭropa. "Mi aranĝis
planan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn. Sed ĉar simila konstruo de lingvo
estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj alkiutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial. .

. 1“. Li komprenis, kion li volas fari, kvankam li mem ne ĉiam sukcesis sekvi siajn principojn. Postaj generacioj de eŭropaj parolantoj de Esperanto kaj miskomprenis kaj intence provis igi Esperanton pli eŭropa. Rasismo (boninteca, pretervola kaj ne rimarkata) estas alia ismo.

Estas tempo por redoni al virinoj kaj al neeŭropanoj sian lokon en Esperanto, ne tuŝante la Fundamentono.
hof!

1. Intencoj de Zamenhof

La intencoj de Zamenhof estis noblaj kaj puraj. Tio estas vera laŭdifine. Li volis fari lingvon, kiu estu facila, regula, sed pli manipulebla ol Volapük. Kun vortaro konsistanta el konataj internaciaj radikoj.

Li, do, volis krei Bonan Lingvon, eble ĉefe ĉar li ne tiom interesiĝis pri la lingvo kiom pri la enhavo, la interna ideo, la homaranismo, ktp.

Ĉiukaze li havis grandan intuician ideon. Malice oni povas diri, ke li havis tiun ideon kaj ne forĵetis ĝin, ĉar li ne estis profesia lingvisto sed nur lingvo-amanto. Ĉiuj postaj grandaj lingvistoj (ni citu nur Jakobson), kiuj provis fari internaciajn lingvojn en la postaj jardekoj alvenis nur al naturismaj meznombraĵoj.

La ideo de Zamenhof estis la jena:

"Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝangaj vortoj. Se vi prenos verkon

1 Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto, 1929 - 12-a eldono, Parizo: Esperantista Centra Librejo, paĝo 248-a.

Skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas sole kaj ĉiam en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per kuniĝo de senŝangaj vortoj.

Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), - li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo."

Tio estas skribita, vere skribita de Zamenhof, ne inventita de mi. Alivorte Zamenhof celis fari lingvon kun neŝanĝeblaj morfemoj, kiel la turka. Sed esperantistoj apenaŭ legis la antaŭparolon de la propraj lernolibroj, kiu, male al tio kion la bona doktoro pensis, ja estas bezona.

2. Kaj kio okazis en la realo...

Okazis, ke ankaŭ la unuaj esperantistoj estis filoj de sia tempo kaj de "sia lingvo". Jam en la unua jaro Zamenhof estis inundata de reform-proponoj. Oficiale ili ŝuldiĝis al la fakto ke la lingvo ne rapide progresis kaj al la deziro forigi tiujn facetojn de la lingvo, kiu malhelpas ĝian progreson. En la realo temis pri la nekonfesinda deziro "malsovaĝigi" Esperanton kaj igi ĝin

pli simila al la “grandaj”okcidentaj kulturlingvoj, alivorte al la franca. Same nekonfesinde hodiaŭ la klopodo estas similigi Esperanton al la angla.

Jam en 1894 Zamenhof publikigis en La Esperantisto ampleksan reformproponaron, kiu estis malakceptita de la tiamaj esperantistoj.

Kaj jen la tiam proponitaj reformoj (kiuj similas al multaj el la nuntempaj):

- La supersignoj malaperas.
- La c estis elparolata kiel malnova ĥ; z kiel malnova c.
- Artikolo ne plu ekzistas.
- La akuzativo havas la saman formon kiel la nominativo.
- En multenombro la substantivoj anstataŭas -o per -i.
- La adjektivo finiĝas, same kiel la adverbo, per -e kaj ne ŝanĝas sian formon.
- La tabelaj vortoj estas anstataŭataj per vortoj prenitaj el la naturaj lingvoj.
- La prepozicio “je” estas unue forigata sed poste aperis en la reformita vortaro.

Kaj jen ekzemplo de la reformita lingvo:

Unuaj vortoj de “Patro nia”: Patro nue kvu esten in cielo, sankte estan tue nomo, venan regito tue, estan volo tue, kom in cielo, sik anku sur tero.

Kaj kelkaj ekzemploj el la vortareto proponata:

- borgeso (= burĝo)
- kavalo (= ĉevalo)
- omnu (= ĉiu)
- koruso (= ĥoro)
- jovedo = ĵaŭdo)
- meilo (= mejlo)
- epolo (= ŝultro)
- sik (= tiel)

En 1909 aperis la unua oficiala aldono al la Universala Vortaro produktita de la tiama Lingva Komitato (nuna Akademio).

En ĝi la agado de la kaŝeŭpistoj estas ankoraŭ pli evidenta.

Jen kelkaj ekzemploj laŭ grupetoj.

La Karavelo n-ro 001 oktobro 2007

En la unua grupo estas vortoj, kiuj rekte kontraŭstaras la vorto-faradon de Esperanto laŭ la Fundamentaj reguloj. Ĉu vi memoras pri la dismeto de la ideoj, kiun havis en la menso Zamenhof?

antipatio: malsimpatio aŭ malinklino

anonima: sennoma

tragikomedio: tragedio, kies finiĝo estas feliĉa

Ni ne komentu pri la enkonduko de la radiko “tragi-“, kiu ŝajne validas nur en ĉi tiu okazo.

Eble ankaŭ

antipodo: loko de la tero, kuŝanta sub niaj piedoj sur la alia duonglobo

estas parto de la enkonduko de la radiko “anti-“ tre vivanta ankaŭ nuntempe en, ekzemple,

“antisemit-“, kiun mi nomus “kontraŭ-ŝem-id-“.

La dua grupo rilatas al la fifama sistemo geografio-geografo, kiu firmigas sian ĉeeston, kaj donas eblecojn al postaj generacioj fari multe pli da strangaĵoj.

filozofio: scienco pri la esencaj plej ĝeneralaj principoj kaj kaŭzoj de la estado. filozofo: scienculo, kiu esploras kaj pritraktas la filozofion.

mito: tradicia fabela rakonto pri antikvaj dioj kaj praaj tempoj.

mitologio: tradiciaj fabelaj rakontoj de la antikvuloj pri la dioj kaj duondiaj herooj.

filologio: scienco, kiu . . . esploras la lingvojn kiel organojn de la spirita vivo de la popoloj.

filologo: scienculo, kiu studas la filologion.

astrologio: arto diveni ion estontan laŭ la astroj.

astrologo: astrologiisto.

astronomio: scienco pri la astroj

astronomo: astronomiisto

filantropo: humanulo, homaramanto aŭ bonfarema homo.

filantropio: humaneco, homaramo aŭ bonfaremo.

teologio: metoda studo pri Dio kaj diaj aferoj.

teologo: teologiisto.

Iom aparta estas la pozicio de:

inkvizicio: mezepoka eklezia institucio kaj tribunalo.

inkvizitoro: membro de la inkvizicia tribunalo.

Ĝenerale abundas okcidentaĵoj:

manuskripto: manskribaĵo, skribaĵo destinita por presiĝo

beletristiko: literaturo laŭ la artisma vidpunkto

depeŝo: urĝa sciigo, sendita per rapida vojo, precipe per telegrafo

kavalerio: parto de armeo konsistanta el rajdsoldatoj

spado: glavo konsistanta el longa, rekta, mallarĝa, pinta kaj unutranĉa aŭ dutranĉa klingo kun tenilo

adjutanto: oficiro, kiu komunikas al la subuloj la ordonojn de generalo

aŭtentika: nedubbele certa, vera aŭ originala, oficiale certigita

hekatombo: buĉofero el cent bovoj, ĉe antikvuloj.

La verkon de la tiama Lingva Komitato daŭrigis kun elano la postaj generacioj, en kiuj oni konstante plu provis forigi la radikojn ĝermanajn aŭ rusajn enkondukitajn de Zamenhof. Se li mem ne estus protekstinta per la Fundamento vortojn kiel “fingro” kaj “tago” kaj “prava”, nun ni certe dirus “deto”, “ĵurneo” kaj “rajta”. Preter la ŝerca tono, efektive statistikaj kalkuloj pri la morfemaro de Esperanto de la Universala Vortaro tra Plena Vortaro ĝis Plena Ilustrita Vortaro, montras ke la procentaĵo de enkondukitaj morfemoj nek francaj nek anglaj praktike emas reduktiĝi al nulo en la lastaj tempoj.

(El oktobro 2007-a numero de revuo La Karavelo. Laŭ permesoj de s-roj Renato Corsetti kaj Joao José Santos)

FUNE BRO

Profundkore ni informas, ke sinjoro **Sasvári, Tibor** nia 90 jara, esperantista kunulo en Debrecen, forlasis nin. Lia entombigo okazis la 3-an de Decembro 2007-a, en la Publiktombejo de Debrecen. Lia forpaso estas granda perdo por ni. Li havis multe da gelernetoj dum lia longa vivo – kiuj ankaŭ nun vivas en nia patrujo. Li instruis ankoraŭ ankaŭ en bazlernejoj senpage, en kadroj de fakrondoj. Li estis grava membro pr. ĝis lia morto ankaŭ de la Debrecena Fervojista Esperantista Klubo. En lia adiaŭigo partoprenis ankaŭ nia samideano Gajdos, Pál.

Imre Cséti, la Hajdu-Bihar departamenta Eo-sekretariisto de HEA

Forpasis Ada Csiszár

Pri sinjorino Ada Csiszár, mi aŭdis unue je eldono de la „Domfabriko”, en 1975.

Persone, mi ekkonis ŝin dum la entombiga ceremonio de nia kara kaj altestimata samideano D-ro Lajos Györy Nagy, prezidanto de la BAZ- departamenta Teritoria Esperanto Komitato Miskolc, dum Februaro de la 1980-a jaro. Tiam, sinjorino Ada Csiszár diris la funebran – oracion, parte de HEA.

Poste kelkfoje ni parolis telefone, skribis rete aŭ perletere unu al la alia, sed ni renkontiĝis neniam plu. Mia edzo rekontis ŝin lastfoje, dum la inaŭguro de busto de sinjoro d-ro Kálmán Kalocsay, en Abaujszántó, en 1986.

Foj- foje ŝi parolis, skribis al ni pri d-ro Kálmán Kalocsay, kaj pri si mem.

„Ada Csiszár, laŭ fraŭlina nomo: Ada N. Szabó naskiĝis la 20-an de Marto en 1930, en Vinogradov. Ŝia patro estis ĵurnalisto. Tiun lokon pro la tiamaj politikaj cirkonstancoj la familio devis forlasi. Ŝi kun la gepatroj trovis azilon en la nuna Hungario.

Ŝi trovis ĝojon unue, en la bibliotekista, librotenista kariero.

Ŝi edziniĝis kun la skulptoartisto Gyula Csiszár en 1948.

Ekde 1961 ŝi laboris kiel ĵurnalisto ĉe la taga ĵurnalo Népszabadság (Popolibereco) en Budapeŝto.

En 1975 ŝi ŝanĝis sian nomon pri Gyuláné Csiszár, al Ada Csiszár (Ĉisar). Ili ne havis infanon.

Ŝi esperantiĝis en 1966, kaj samjare konatiĝis kun d-ro Kálmán Kalocsay.

En 1975 ŝi kunlaboris kun d-ro Kálmán Kalocsay en verkado de la frazeologia -kolektaĵo DOMFABRIKO.

Dum 1973 kaj en 1977 ŝi iĝis komitatano, en 1981 estiĝis estrarano de HEA

Post morto de d-ro Kálmán Kalocsay (1976), por gardi lian memoron, ŝi multe laboris. La 21-an de Marto de la 1982-a jaro ŝi inaŭguris la Kalocsay-strateton en Abaujszántó en lia naskiĝejo.

En la 1983-a jaro, la 3-an de Aŭgusto ŝi kunfondis la Kalocsay memorĉambron en la Lokhistoria-Muzeo de Abaujszántó (Nordhungario), krome iniciatis la fondiĝon de „Internacia Komitato por honoro al Kalocsay”. La 8-an de Novembro en 1986 ŝi inaŭguris la buston de d-ro Kálmán Kalocsay, en Abaujszántó. Por la centa datreveno de naskiĝo de d-ro Kálmán Kalocsay, en 1991 ŝi fondis kaj iĝis prezidanto de Kolomano Kalocsay Amika Societo. Ekde tiam ŝi editoris kaj eldonis 25 volumojn, kiuj prezentis la plej diversajn facetojn de Kalocsay.

"Omaĝe al Kálmán Kalocsay" - kun la titolo de ŝia okvoluma verko ni povus resumi la esencon de la esperantista agado de Ada Csiszár, kiu forpasis en sia 77-a aĝo en Budapeŝto. Esperantisto estis kvardek jarojn, ŝi ja aktivis divers-postene en la movado, i.a. kiel sekretario de Esperantlingva Verkista Asocio (1983-89), sed ŝi estos precipe memorata kiel gardantino de la fajro de Kalocsay.

La 20-an de Novembro 2007-a forpasis Ada Csiszár, la precipa prizorganto de la spirita heredaĵo de Kálmán Kalocsay. Ŝia forpaso granda perdo estas por ni ĉiuj

(Pri la www.liberafolio.org, Eo-vikipedio, Gazeto Norda Panoramo –verkita de Barnabás Batta, de OIK: s-rino Ilona Bóde)

Adrienne, s-rino Pásztor



Ada Csiszár inaŭguras la memortabulon de Kalocsay-strateto en Abaujszántó la 21-an de Marto en 1982. Kiu legas, tiu estas s-ino Ada csiszár.

FABELO

Aili Konttinen:

UNUA NEĜO

Iun matenon, kiam la infanoj vekigis, la mondo ŝajnis mirinde senbrua. Ekstere estis ankoraŭ tute mallume, tiel ke nur nigro videblis tra la fenestro. Sed kiam panjo revenis el la bovinejo, aŭdigis el la antaŭĉambro stranga sed tamen konata bruo. Temis pri ĝuste tia bruado, kiu estiĝas, kiam oni piedfrapas neĝajn botojn kontraŭ la plankon.

Ekscititaj la infanoj fiksrigardis la pordon. Jam entretis Panjo. Ŝia kaptuko, la manikoj kaj ŝultroj de ŝia jako estis blankaj de neĝesteletoj. Neĝadis do. Vera blanka vintro venis.

Plej mirinda estis la komenciĝo de la vintro al la hundo Pirre. Ĝi estis ja nur pasintsonera hundido, kiu antaŭe neĝon ne vidis. Nun ĝi paŝadis flarante jen aeron jen teron. Ĝi levadis la piedojn el la neĝo kaj mallevis ilin singarde, kvazaŭ timeme. Kiam la degelantaj neĝeroj tiklis ĝian muzelon, ĝi frotadis ĝin kaj diris: Voh, voh!

Kiel amuze, kiel amuze! kriis la infanoj kaj ridis, ridegis senbride.

Poste ili ludadis rulante sin en la mola neĝo ĝis ili ĉiuj estis blankaj kaj neĝohomoj.

Ĉu jam komenciĝas la vintro? Demandis Panjo rigardante la neĝajn vestojn dev la etuloj.

Jes, jam, jam! Kriis la infanoj.

Voh, voh! Bojis Pirre.

Kaj Pirre en sia ĝojo kuregis ĉirkaŭe en la korto, tiel ke neĝeroj kirliĝis en la aero.

Venis la vintro.

(La fabelon sendis Sylvia Hämäläinen el Tampere, kaj ŝi skribis ankaŭ la malsuprajn:

"Sur la kajereto de fabeloj estas skribite "Etaj rakontoj tradukitaj de finna legolibro por plenumi la peton de Esperanto-societo en japana urbo." La rakontojn tradukis Irja Klemola, Avinjo, kaj sendis ilin al iu japana klubo.

Aili Konttinen verkis la fabelon: Unua neĝo

„Irja Klemola, vivis 1898-1995. Ŝi estis grava persono en la finna Esperantujo ekz. ŝi estis prezidanto de EAF dum sep jaroj. Ŝi estis honora membro de UEA ekde 1980. Ŝi lernis la internacian lingvon jam en la 20aj jaroj. Ŝi estis instruisto pri matematiko en knabina lernejo en Turku kaj dum 20 jaroj ties rektoro.”)

Kiel mi perdis 5 jarojn el mia esperantista vivo?

En la lernojaro 1959/60 mi vizitis sud-hungarian, provincan, medicinan universitaton. Somere de 1960, en julio mi devis partopreni „socian laboron” en iu vilaĝa agrikultura kooperativo, kaj fine de la unua monato de la someraj ferioj mi estis korpe-anime sufiĉe laca. Mi serĉis „spiritan nutraĵon”, kiam mi – promenante sur la Malgranda Bulvarde de Budapeŝt – rimarkis en la montrofenestro de Librovendejo de la Pedagogoj maldikan Lernolibron de Esperanto, kies aŭtoro estis Julio Baghy.

Ĝis tiam mi sciis pri Esperanto nur la kutiman frazon, ke – „Ĝi estas ia artefarita lingvo.” La libreto estis tre malmultekosta, do mi riskis 14,- forintojn kaj aĉetis ĝin. (Mia monata stipendio estis tiutempe 700,- forintoj.) Veturante hejmen, jam en la trajno mi scivole tralegis la Antaŭparolon kaj la Gramatikan enkondukon. Tie min kaptis la melodio de Esperanto, kiam mi legis strofon el la fama poemo „Fine de septembro” de Sándor Petőfi, nia poeto-liberecbatalanto:

Jen floras ankoraŭ la floroj en valo,
Jen verdas ankoraŭ la poploj ĉe l' font',
Sed vidu, jam tie la vintra vualo,
La neĝo ekkovris la supron de l' mont'.

La unuan tagon mi ellernis la Enkondukan lecionon, la alfabeton kaj la fonemojn, la vokalojn kaj la konsonantojn, ilian prononcon, la akcenton kaj la bazajn regulojn de la ortografio.

La duan tagon mi pasigis per lernado de la unua leciono, la trian tagon per alproprigo de la dua leciono, kaj ĉiutage – dum 6-8 horoj – mi ellernis unu lecionon...

Ĝis la fino de aŭgusto mi trastudis la tutan lernolibron, kaj mi estus povinta paroli Esperanton mezgradnivele, se mi havintus esperantistan partneron. Neniu alia lingvo donis al mi tiel grandan sukcestravivaĵon, kian la lernado de Esperanto rezultigis. Bonhumore kaj feliĉe mi komencis la duan studjaron. Fiere mi rakontis al nia universitata, gvidanta lektoro pri fremdlingvoj mian someran, lingvistikan esperanto-aventuron.

Kiel malvarmega duŝo tuŝis min la opinio de la ŝatata kaj respektata sinjoro lektoro: - „Ludoviko, komprenu bone, ke Esperanto tute ne estas lingvo. Ĝi estas stultaĵo. Serioza homo ne okupiĝas pri Esperanto. Lernu anstataŭ Esperanto normalan lingvon, ekzemple la italan!...”

Tiel okazis, ke en la sekvantaj kvin jaroj mi tute ne okupiĝis plu pri la internacia lingvo Esperanto.

Do en la dua studjaro de la universitato – laŭ la propono de la sinjoro lektoro – mi komencis lerni la italan lingvon.

(Dum la unua studhoro mi surprizite konstatis, ke ĝuste la sinjoro lektoro instruas la italan lingvon. Tiu ĉi lingvo ŝajnis al mi tre facila: „La lingua italiana è molto facile per me.” Nek la sinjoro lektoro, nek miaj samgrupanoj volis kredi, ke antaŭe mi neniam lernis la italan lingvon. Ili pensis kaj diris, ke mi mensogas asertante, ke vere, mi neniam lernis ĝin. Nur nun, post jardekoj de senĉesa uzado de Esperanto mi malkovris, ke tiutempe mi spertis la kapabloevoluan, „prepedeŭtikan” efikon de Esperanto, la fakton, ke helpe de Esperanto oni povas facile alproprigi la metodikon de la lingvolernado.)

Dum la sekvintaj 5 jaroj la maldika lernolibro de Julio Baghy kuŝis ie sur mia librobreto. Mi provis uzi la germanan, anglan kaj rusan lingvojn dum miaj universitataj studoj, - sed mi ĉiam sentis la malkomfortan fakton, ke parolante kun denaska germano, anglo kaj ruso mi estas kaj eterne restos „duaranga lingvouzanto”, kiu neniam diras tion, kion volas, sed nur tion, kion povas.

Post mia duonjara soldata servo, en 1966 mi komencis mian kuracistan praktikon en la budapeŝta Hospitalo Ladislao por Infektaj Malsanoj, en la sekcio de ĉefkuracisto D-ro Kolomano Kalocsay. Mi estis deĵoranto iun posttagmezon, kiam la ambulancoj enportis maljunulon en la sekcion. Sur la dokumentoj de la paciento mi ekvidis la nomon Julio Baghy.

De kie mi konas ĉi tiun nomon?

Post mallonga cerbumado mi malkovris, ke mi vidas la aŭtoron de la iama, maldika Esperanto-lernolibro...

Depost nia unua, persona renkontiĝo mi ofte vizitis la „Paĉjo”-n, Julion Baghy, ĉe lia hospitala lito. La maljuna, malsana, sufokiĝanta homo plibeliĝis, kiam li parolis pri Esperanto. Li rakontis la historion de sia vivo, la militkaptitecon en Siberio, la vojaĝojn dise en Eŭropo, kiam li ĉie instruis Esperanton. Li rakontis pri la poeto-amikeco kun Kolomano Kalocsay, pri la revuo Literatura Mondo, pri la universalaj kongresoj de Esperanto. Li donacis al mi la esperantlingvan Faraono-n de Bolesław Prus. La tri-voluman romanon mi baldaŭ tralegis kaj grandparte komprenis. Tio estis mia dua, granda sukcestravivaĵo kaŭzita de Esperanto.

Jen, koncize la historio de mia „aventuro” kun Esperanto. Mi fariĝis la lasta disĉiplo de Julio Baghy, kiu transdonis al mi sian amon kaj entuziasmon rilate al Esperanto.

En la jaro 1969 ni fondis kaj ekde tiu jaro ni funkciigas la Budapeŝtan Medicinan Esperanto-Fakgrupon.

Kaj fine de tiu ĉi historieto permesu al mi la kara Leganto tiri la plej gravan konkludon el mia „aventuro”.

Kiel 20-jara junulo mi senvorte kaj senkritike akceptis la opinion de la ŝatata kaj respektata universitata lektoro. Mi supermezure estimis la aŭtoritaton. Dum la pasintaj preskaŭ kvin jardekoj mi ellernis la lecionon: ĉiu homo devas elformi sian pensmanieron kaj opinion. Ĉar estas ĉiam pli facile akcepti alies opinion, ol malrapide, malfacile, turmentiĝante krei sian propran starpunkton.

„Se la devigan disciplinon anstataŭigus la memdisciplino, nur tio povus certigi la estonton de la homaro.” (Profesoro D-ro Owe Bruno Fahlke)

La 14-an de februaro, 2007

D-ro Lajos Molnár, prezidanto de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

Aleksandro Petőfi

Antaŭ 125 jaroj, la 1-an de Januaro 1823-a naskiĝis Petőfi, Sándor († 1849) la granda hungara lirikisto. Bonvolu akcepti de li la malsupran poemon:

Petőfi, Sándor: Granda estas mond' sen fino...

Granda estas mond' sen fino,
Eta estas vi, knabino,
Sed mi, se mi vin posedus,
Por la mond' pri vi cedus.

Vi: la tag', mi? Nokto meza,
Plena de mallumo peza.
Se fandiĝus kor' al koro,
Kiel ravus min aŭroro!

Ne rigardu min! L' okuloj
Min konsumas per la bruloj.
Ho, sed ja vi min ne amas:
Bone, se L' anim' forflamas.

(Petőfi: Libero kaj amo-trad. D-ro K. Kalocsay)

Saĝaj diroj

La toleremo ne estu tolero, sed reciproka honoro kaj estimo kontraŭ ĉio kaj ĉiu!

Antaŭ ol la homo prijuĝas homkunulojn, povu ekkompreni ties situacion!

Gardo kaj estimo de la tradicioj ne signifas konservecon!

Esperantigis László Pásztor

JARDATREVENOJ

Dum la jaro 2008-a multaj gravaj menciindaj datrevenoj okazos. Ankaŭ por ni esperantistoj! El inter tiuj, mi emfazas nun la malsuprajn. Pri ĉi tiuj kaj pri la al tiuj ligiĝantaj festoj, ni skribos pli dense en la sekvaj numeroj.

100 jara estas la UEA

100 jara estas la UMEA

100 jara estas la Eo-movado en urbo Łódz, Pollando

95 jara estas la Esperanto instruado kaj movado en Miskolc,

25 jara estas la Kalocsay-memorĉambro en Abaujszántó

Adrienne, s-rino Pásztor

LA UNUA BULTENO
pri la tutmonda kongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilnius, Litovio
26 – 30. 05. 2008

Litova ĵurnalista asocio kaj Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni tutmondan kongreson de esperantistoj-ĵurnalistoj en chefurbo de Litovio Vilnius la 26-30-an de Majo, 2008.

Ĉeftemo de la kongreso: „Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto“. Kongreso ankaŭ ligiĝos al Internacia Jaro de Lingvoj kaj al proksimiĝantaj 1000-jariĝo de Litovio en 2009 kaj al Vilnius kiel Eŭropa kultura ĉefurbo en la sama jaro.

Loko: La kongreso okazos en malnova historia urbodomo de Vilnius (str. Didzioji 31). Vilnius estas atingebla aviadile, trajne, buse kaj aŭtomobile.

Tempo: La kongreso funkcios la 26-30-an de Majo, 2008. Veni al la aranĝo preferindas jam la 25-an de Majo, 2008. Dezirantoj povos uzi semajnfinojn antaŭ la kongreso kaj semajnfinojn post la kongreso. Estas antaŭvidite, ke duono de la tempo estos uzata por kunvenoj kaj alia duono por ekskursoj tra Vilnius kaj Litovio.

Partopreno: Al la kongreso estas invitataj ĉiuj nunaj kaj iamaj membroj de TEJHA (Tutmonda esperantista-ĵurnalista asocio), ĉiuj aliaj profesiaj kaj praktikantaj ĵurnalistoj (redaktoroj de paperaj gazetoj kaj revuoj, verkantoj de artikoloj, fotistoj, ilustrantoj, ĵurnalistoj de Esperanto-radioj, redaktoroj kaj ĵurnalistoj de retgazetoj) , homoj de apudaj profesioj iel rilataj al ĵurnalismo - literaturistoj, verkistoj k.s. Ankaŭ al la kongreso estas invitataj ĉiuj estraranoj de UEA kaj ties ĝenerala direktoro. Entute ni antaŭvidas ĉirkaŭ 100 partoprenantojn.

Programo: Estas antaŭvidataj prelegoj kaj diskutoj pri la ĉeftemo, kunvenoj de TEJHA, aliaj rilataj programeroj. Proponoj, konsiloj kaj sugestoj por la programo estas atendataj, ankaŭ sinproponoj por prelegi, raporti pri la kongresaj temoj. Laborlingvo de la aranĝo estas Esperanto.

Financaj kondiĉoj: 1. Aliĝkotizo ne ekzistas.
2. Loĝado en hoteloj dum la kongresa periodo estas senpaga.
3. Manĝado dum la kongresa periodo estas senpaga.
4. Organiza komitato pretas plene aŭ parte kovri vojaĝelspezojn por tiuj personoj, kiuj sen financa helpo ne povus veni al la kongreso (ĝis 250 eŭrojn por eŭropanoj kaj ĝis 500 eŭroj por ekstereŭropanoj). Unue financon helpon ĝuos kontribuantoj al la kongresa programo kaj tiuj personoj, kies partopreno en la kongreso estas dezirinda kaj preferinda. Pri ĉiu aparta kazo decidus organiza komitato.

Aliĝo: Per plenigo de aldonata aliĝilo kaj ĝia sendo al Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44287, Kaunas, Litovio. Eblas aliĝi telefakse +370-37-228616 aŭ rete al litova.ea@mail.lt . Limdato por aliĝi estas la 30-a de Aprilo, 2008. Aliĝiloj riceveblas ĉe LEA.

Loĝado: En urbaj hoteloj (Eotel, Holiday Inn, Novotel k.s.).

Manĝado: Matenmanĝo en hoteloj, aliaj manĝoj en lokoj anoncotaj iom poste.

Vizoj: al Litovio senvize rajtas veni civitanoj de ĉiuj landoj de Eŭropa Unio kaj de multaj aliaj landoj. Aliaj vizojn havigu anticipe en Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turnu Vin por helpo al Litova Esperanto-Asocio. Se necesos, organizantoj sendos oficialajn invitojn por la kongreso.

Aliaj gravajoj: Fine de Aprilo – komence de Majo, 2008 ĉiu aliĝinto ricevos La Duan Bultenon pri la kongreso kun pli detalaj kaj aktualaj informoj. Aktualajn informojn pri la ĵurnalista-esperantista kongreso Vi trovos ankaŭ en retejo de Litova Esperanto-Asocio www.esperanto.lt .

Aliĝ-kontaktadreso: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Telefono de LEA estas +370-37-208503 (landa kodo, urba kodo, numero), poŝtelefono estas +370 687 12219 , telefakso estas +370 37-228616. Retadreso de LEA estas litova.ea@mail.lt .

BONVENON AL LITOVIO!

Organiza komitato – 05.01.2008.

ALIĜILO
al la tutmonda kongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj
Vilnius, la 26 – 30-an de Majo, 2008

(pasportajn enketaĵojn kaj adreson laŭeble tajpu aŭ skribu legeble per majusklaĵ presliteroj)

1.Nomo kaj familia
nomo _____

2.Sekso _____

3.Naskiĝdato (tago, monato, jaro) _____

4.Hejma (poŝta, koresponda)
adreso _____

5.Telefonoj (hejma, ofica, kun necesaj prefiksoj)

6.Telefaksoj (hejma, ofica) _____

7.Retadreso _____

8.Civitaneco kaj
nacieco _____

9.Pasporta numero (nur por tiuj, kiuj bezonas inviton por vizo)

10. Profesio,
specialeco _____

11. Laborloko, studloko,
posteno _____

12. Klero, scienca grado,
titolo _____

13. Kiun E-amaskomunikilon reprezentas (aŭ kun kiu
kunlaboras) _____

14. Mi kontribuos al la programo de la kongreso
per _____

15. Mi proponas por la programo de la
kongreso _____

16. Mi petas financon helpon por vojaĝo (notu deziratan sumon en eŭroj
) _____

17. Mi bezonas oficialan inviton por ricevi
vizon _____

18. Eventuala alvenigo al Vilnius kaj maniero (ekz. flugnumero, horo k.s.)

19. Eventuala forirado el Vilnius kaj maniero (ekz. flugnumero, horo k.s.)

20. Ĉu Vi bezonas tranoktejon en hotelo por la daŭro de la
kongreso? _____

21. Rimarkoj _____

Dato de la
aligo _____ Subskribo _____



Osmo Buller UEA – nia monda organizaĵo

Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas la plej granda Esperanto-organizaĵo en la mondo. Ĝi estas ankaŭ la plej grava Esperanto-organizaĵo. Kvankam nur parto de la esperantistoj de la mondo membras en UEA, pli-malpli ĉiuj esperantistoj rekonas, ke UEA reprezentas ankaŭ ilin. Ankaŭ por ne-esperantistoj UEA estas la reprezentanto de la esperantistaro. Tial Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko starigis oficialajn rilatojn kun UEA kaj invitas reprezentantojn de UEA al siaj kunsidoj kaj petas komentojn de UEA pri siaj dokumentoj.

Nun vi iom konatiĝu kun UEA!

UEA naskiĝis la 28-an de Aprilo 1908 en Ĝenevo, Svislando. Unu el ĝiaj fondintoj estis la 19-jara junulo Hector Hodler, kiu fariĝis la unua direktoro de UEA. Unu jaron pli frue li jam transprenis la revuon *Esperanto*, kiu estis fondita en 1905. Ĝi fariĝis oficiala organo de UEA. Hodler transprenis ankaŭ la reton de “konsuloj”, kiu estis kreita en 1906. Poste la konsuloj ricevis la nomon “delegitoj”. Ankaŭ nuntempe la Delegita Reto estas unu el la plej famaj servoj de UEA. Delegitoj respondas al plej diversaj informpetoj de membroj de UEA kaj iliaj adresoj aperas en la Jarlibro (en Jarlibro 2006 troviĝas 1789 delegitoj en 99 landoj). La Jarlibro estas ankaŭ en Interreto, reto.uea.org, kie membroj de UEA povas uzi ankaŭ aliajn servojn, kiuj ne estas eblaj per la papera Jarlibro. Ĝuste la ebligado de praktikaj servoj per Esperanto estis unu el la celoj de Hodler, kiam li fondis kaj ekgvidis UEA. Li havis ankaŭ idean celon: "krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj". Ekde la komenco ĝis hodiaŭ idealismo kaj praktikismo iris man-en-mane en UEA.

Komence nur individuoj povis esti membroj de UEA. Por kunlaboro inter landaj Esperanto-asocioj estis Internacia Centra Komitato, kiu organizis i.a. Universalajn Kongresojn. En 1933 estis farita Interkonsento de Kolonjo, per kiu UEA fariĝis komuna organizaĵo de landaj asocioj (tutempe oni nomis ilin “naciaj societoj”) kaj de individuaj membroj (oni nomis ilin “aktivaj membroj”). Tio estas la baza strukturo ankaŭ de la nuna UEA.

En 1936 okazis krizo. Ekde la komenco la Centra Oficejo troviĝis en Ĝenevo, sed pro la altaj kostoj tie oni volis movi ĝin al Londono. La svisoj kontraŭis tion. Tiam preskaŭ ĉiuj landaj asocioj kaj plimulto de la membroj fondis novan asocion kun la nomo Internacia Esperanto-Ligo (IEL). Ĝia sidejo estis en vilaĝo apud Londono. La skismo feliĉe ne daŭris tre longe kaj en 1947 UEA kaj IEL reunuiĝis sub la flago de UEA. La Centra Oficejo de IEL fariĝis CO de la unueca UEA, sed en 1955 ĝi translokiĝis denove. La situo en kamparo apud Londono estis maloportuna, sed prezoj en la urbocentro estis tro altaj. Oni trovis malmultekostan ejon en la nederlanda havenurbo Roterdamo kaj movis la oficejon tien. Unue la CO estis en luita domo, sed en 1961 UEA aĉetis propran domon en la adreso **Nieuwe Binnenweg 176**. En tiu domo la CO troviĝas ankaŭ nun.

- daŭrigo sekvas -



Sendis Johano Kisspál - Mezökövesd



NORDHUNGARIA INFORMO

Redaktorok:

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel: + 36 70 206 1739

Tel: + 36 70 570 8895

Retpošto: pasztor.laszlo4@chello.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu